

Kongresa Numero

Revuo
ESPERANTO

Internacia

N-RO 550 (9) · SEPT. 1951



München : La urbdomo kaj la du turoj de Frauenkirche

Septembro 1951

N-ro 550 (9)

Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio

Fondinto : H. HODLER

Redaktoro : HANS JAKOB

Helpredaktoro : MASON STUTTARD

Ĉion por la redakcio sendu al
ESPERANTO
 Palais Wilson, Genève, Svis.
 Urgajn informojn sendu rekte
 al Rickmansworth

Traduko kaj represo de artikoloj estas permesataj, kondiĉe ke oni citu la fonton. Oni sendu tian represaĵon al nia redakcio.

Ĉion pri administrado de UEA kaj de la
revuo ESPERANTO, abonado, reklamoj,
anoncetoj sendu al

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
Heronsgate, Rickmansworth, Herts.,
Anglujo

**Jara abono : 8 ŝil. angla (kun membreco
kaj jarlibro 12ŝ. 6p.)**

Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj

Tarifo por reklamoj :

1 paço £6	$\frac{1}{2}$ paço £3
$\frac{1}{4}$ paço 30 sêl.	$\frac{1}{8}$ paço 15 sêl.

Anoncetoj pri korespondado :

2 pencoj por unu vorto aŭ 1 int. respond-
kupono por ĉiu duo da vortoj

Legantoj en 74 landoj

Eldonnombro 6000



Enhavo

							pago
La 36-a Universala Kongreso de Esperanto :	Georges Agricola	..					217
Festparolado :	D-ro E. Privat ..						221
Ferma parolado :	D-ro P. Kempeneers ..						230
Poemo :							
La Novulo :	A. D. Foote	..	..	..	..		237
Konstantaj Rubrikoj :							
Tra la mondo Esperantista		..	..	..	..		233
Enigma konkurso (premioj)		..	..	..	..		234
Esperanto kaj Radio		..		..	..		238
Internacia Konkurso 1951	..			..	..		234
Felietono "La Alaska Stafeto"			..	..	..		235
Esperantista Vivo	..	..	..	..	..		239
Oficiala Informilo	..	..	..	..	..	..	240

(Pro manko de spaco diversaj raportoj pri la ceteraj kongres-aranĝoj, kaj pri aliaj Esperantaj aranĝoj lastatempaj, ne povis aperi en la nuna numero.)

Revuo

ESPERANTO

Internacia

N-ro 550 (9)

Septembro 1951



Georges Agricola :

Ĉirkaŭ la 36-a Kongreso

Impresoj

Rapide kuris la tempo kaj ni kun ĝi ! Apenaŭ Pariza Kongreso finiĝis, ekkomenciĝis la laboroj por la Munkena kaj jen, ni jam estas en tiu ĉi urbo. Kiel ni ĝin trovos, la gajan urbon de artistoj, la lokon de la lojal-krudeca afableco, de la biero ?, jen la demandoj por tiuj kiuj ne revidis Munkenon depost 1939. La unua impresoj, kiam oni alvenis en la stacidomo, estis premiga. Stacidomo detruita je tri kvaronoj, parto rekonstruita, ĉie provizoraĵo, sed ankaŭ ĉie laborantaj homoj por refari aŭ ripari. Salutas nin super la muro grandega afiŝo kun la prom-esplena titolo

36-a Universala Kongreso de Esperanto

4-a-11-a Aŭgusto 1951

Laŭtparolilo aŭdiĝas. La direkcio de la Germana Fervojo salutas en Esperanto la alvenantajn gastojn. En la stacidoma akceptejo granda alfluo de kongresanoj, gvidataj kaj konsilataj de la lokaj helpantoj, krioj, manpremoj, mallonge, la kutima atmosfero de Kongreso kie

ne ekzistas lingvaj baroj. Ekzistas efektive ia fluidaĵo mistera en niaj kongresoj, ia stranga sento ne klarigebla. Homoj kiuj ne konas sin, alparolas sin, ekestas tuja kontakto kia ne ekzistas inter nacioj de sama lingvo. Se la vorto *patriotismo* ne havus tiun ĉi akompanon de io teda, tro uzita kaj malbone komprenata, mi dirus, ke estas la "esperantista patriotismo" kiu regas en tiuj ĉi momentoj por ĉiu, kiu por la unua fojo venas al nia kongreso.

En la kongres-oficejo, febra movado. Diligente la oficistoj disdonas dokumentojn. Afere sed ĉiam ridetante laŭ recepto "*Keep smiling*" nia konstanta Kongresa sekretario, Mason Stuttard, supervidas, korektas, konsilas kaj kuras. Kiom la Esperantistoj babilas, estas neimageble. Se kongresanoj jam disiras, ili ankoraŭ longtempon babilas.

Foliumante la kongreslibron evidentiĝas ree kiom ampleksa iĝis nia jara manifestacio. Neniel eblas esti ĉie, kaj la tipo de kongresano, kiu partoprenis ĉiujn kunvenojn ne plu ekzistas.

Interkona vespero, jen magia vorto. Problemo por la organizantoj *kie* kaj *kiel* ĝin aranĝi. Kiu ejo en Munkeno allogas pleje, urbanon kaj fremdulon? Estas la "Hofbräuhaus" (ne rompu vian langon, prononcante tiun-ĉi vorton!!) En tiu ĉi domo, proksime de la Urba Domo, kaj pli speciale en la belega salonego troviĝas la dumil kongresanoj. La tradicio volas ke tie ĉi oni konsumu bieron. Kompatindaj kongresanoj nekutimitaj je tiu ĉi granda bierglaso (unu litro) kiun oni metis antaŭ ilin! Nu, mi vidis ke rapide oni akceptis tiun ĉi leĝon de bierkonsumado. Cetere—la alkohola procentaĵo estas malalta, sekve ne danĝera ĉe unu tia glaso. Regas tiu ĉi Munkena atmosfero, kion germana esprimo difinis kiel "Bierseligkeit," proksimume "bieranimeco." Gaja muziko, kantoj el pasinta tempo, preskaŭ forgesitaj kun nuntempaj "Schlager," unuvorte multege da bruoj. Nelacigeble, la impresario de la vespero, samideano Ehbauer atentis kiel arkanĝelo Mikaelo, je la bona irado de la programo. Malfrue jam je ekkomenciĝanta matengrizo, finis la Interkona vespero.

Kian impreson faras Munkeno, urbo multfoje bombardita? Nu, mi nomus ĝin "Urbo de l'ordigita ruinaro." Matene antaŭ la Solena Malfermo, rondveturo konfirmas tiun ĉi kvalifikon, la ruinoj de centoj da domoj estas iel aranĝitaj. Strange impresas, kiel la kompatema naturo jam serĉas kovri per herboj kaj ĉiaspecaj kreskaĵoj la detrulaboron homan. Rekonstrui ĉion estas afero de jarcento, kaj tio postulas kapitalojn gigantajn. Vole nevole oni reiras la tempon kiam tie ĉi ekleviĝis tiu ĉi movado, kiu devis transformi Eŭropon kaj ĝisradike

influi la vivon de milionoj da homoj. Ĉu iam la homaro atingos tiun ĉi eternan deziron ke rezono regu instinkton sovaĝan? Ni esperu kaj ni laboru!

Evangelia diservo en Preĝejo Sankta-Luko antaŭiras la gravan eventon de la

Solena Malfermo

Ĉe rivero Isar troviĝas la fama "Deutsches Museum" kies ĉefa karakterizo estas, ke ĝi precize ne estas muzeo, laŭ la kutima kompreno. Giganta salono ĝuste sufiĉa por akcepti nin. Silento atendoplena, kiam suriras la estradon la Komitato, la registaraj delegitoj, la reprezentantoj de la Landaj Asocioj. Orgenludo majstre plenumita de Profesoro Wiesmeyer kreas la atmosferon esprimeblan per la vortoj


Ĝoju mia kor' dum tiu ĉi hor'
de frata harmoni'.

Precize je la deka, D-ro Kempeneers, Vicprezidanto de UEA, leviĝas kaj alparolas la kongreson.

Sin turnante al la reprezentanto de la Bavara Registaro kaj al la kongresanaro, D-ro Kempeneers, memoras je la forestanta prezidanto de UEA, Ernfrid Malmgren, kiun grava malsano jam de monatoj malebligis plenumi lian rolon. Li legas jenan komunikaĵon de la prezidanto:

"Al vi feliĉuloj, kiuj nun ĝuas la avantaĝon ĉeesti la kongreson, mi kore salutas, dezirante al vi agrablajn, sukcesplenajn kaj memorriĉajn tagojn" (Aplaŭdo).

Daŭrigante, D-ro Kempeneers, unuavice esprimas la koran dankon al la invitantoj kaj organizantoj de la 36-a kongreso. Li salutas la



D-ro P. Kempeneers.

ĉeeston de la Usona Komisaro por la Bavara Lando, Sinjoro Shuster ; la ŝtatministron por Edukado, D-ron Schwalber, honoran protektanton de la kongreso, reprezentante tie-ĉi la Bavaran Registaron ; la prezidanton de la Registaro de Supra Bavarujo, D-ron Kneuer ; la reprezentanton de la Federacia Ministro por Trafiko, Fervojan Direktoron Schuchmann ; la reprezentanton de la ĉefurbestro, D-ron Fingerle, Urban Lernejan Konsiliston ; al la Universitato de Munkeno kaj al ĝia Rektoro, Prof. D-ro Schmaus, kiu akceptis la rolon de Honora Protektanto de la Internacia Somera Universitato ; kaj fine la oficialajn reprezentantojn de registaroj eksterlandaj.

Sed tute apartan dankon al la organizantoj, la anoj de LKK, al ĝia prezidanto D-ro Ziegler, kiu kunigas en si apostolan entuziasmon por la afero kaj la akuratecon de lerta afergvidanto. Lin subtenis la anoj de la Komitato kaj neforgesinde, la Konstanta Kongresa Sekretario Sinjoro Mason Stuttard, kiu jam havis okazon montri sian talenton kaj kapablon. (Aplaŭdo).

Sin turnante al Profesoro D-ro Ivo Lapenna, la Vicprezidanto de UEA gratulas lin pro lia senlaca penado pri la kulturaj aranĝoj de la kongreso, la Somera Universitato, Oratora Konkurso, Belartaj Konkursoj.

“Estas granda plezuro vidi inter ni kiel gaston nian eminentan pioniron, verkiston, oratoron, D-ron Edmond Privat, pri kies decida rolo en la gvido de niaj aferoj necesas diri kelkajn vortojn. Al li ni dankas la tiom gravan raporton de la estinta Ligo de Nacioj, pri la demando de Internacia Helpa Lingvo, al multaj sukcesoj en internaciaj aferoj, al la ideo pri Interŝtata Akordo. Se ne realiĝis ĉiuj espero ligita al multaj el liaj intervenoj, ni tion ja ŝuldas al la cirkonstancoj kaj al la malstabileco de la vivo inter la du militoj. La ĉeesto de D-ro Privat estu signo de tiu sento de kunligiteco inter la amikoj de la ideo de internacia lingvo.

Sed karaj kongresanoj, ĉiuj penadoj, ĉiuj klopodoj de nia flanko estus vanaj, se vi, popolo esperantista, ne apogus la kongreson per via ĉeesto. Spite de tempo maltrankviliga kaj necerta, vi ne hezitis kaj spitis ĉion, por veni al Munkeno. Via multnombra ĉeesto pruvas al la mondo, ke Esperanto ne estas ia retorta kombinaĵo, sed vivanta lingvo de vivanta popolo. Ni sentas nin membroj de tiu ĉi rondo familia, de tiu ĉi homa familio pri kiu revis D-ro Zamenhof, kreinto de Esperanto. En tiu ĉi spirito disvolviĝu la 36-a Universala Kongreso de Esperanto, kiun mi deklaras malfermita.”

Longa aplaŭdo sekvis la varmajn parolojn de D-ro Kempeneers.

Sekvas nun la kutima elekto de la Kongresa Estraro. D-ro Kempeneers

konigas la proponon de la Loka Kongresa Komitato kaj de la Estraro de UEA :

Prezidanto de la Kongreso : D-ro Paul Kempeneers,

Vicprezidantoj : D-ro Siegfried Ziegler, Prof. D-ro Ivo Lapenna, Ĝenerala Sekretario : C. C. Goldsmith,

Sekretario : Mason Stuttard.

La Kongreso akceptis tiun ĉi proponon kun aplaŭdo.

La vico nun estas al la salutparoloj de la registaraj reprezentantoj, nome :

D-ro Schwalber, Bavara ŝtatministro de Edukado,

D-ro Kneuer, Registaro de Supera Bavarujo,

D-ro Fingerle, Urbestro de Ĉefurbo München.

La tri parolantoj krom la kutimaj bonvenoj havis preskaŭ flatajn vortojn por nia movado, la spirito kiu regas inter ni kaj por la celkonscio per kiu la Esperantistoj iras al sia celo. Agrable surprizis, ke D-ro Fingerle, la reprezentanto de l'Urbestro, parolis en Esperanto, flue, vigle, sprite. Li lernis la lingvon post la Germana Kongreso en 1948 kaj ĉiuj ĉeestantoj de la nuna kongreso konsentas, ke li meritas mencion "*Summa cum laude*."



D-ro
Siegfried
Ziegler.

Estas la vico al la Prezidanto de la Loka Kongresa Komitato, D-ro Siegfried Ziegler, kiu klare kaj koncize salutas la kongreson kaj dankas por la konfido donita al li kaj al liaj kunlaborantoj. (Varma kaj forta aplaŭdo)

Kiel oficialaj delegitoj salutis la kongreson :

Federacia Fervojo Germana : (Trafik-ministerio) Fervoja Direktoro D-ro Schuchmann (reprezentante la Ministraron D-ran Seebohm) ;

Aŭstria Respubliko : Generalkonsulo D-ro Afuhs (en Esperanto)—(certigas la daŭran intereson de sia registaro por nia afero pruvitan per multaj faroj, interalie la oficiala subteno de la Esperanto-Muzeo en la Imperiestra Kastelo en Vieno) ;

Registaro Belga : D-ro Paul Kempeneers.

Franca Ministro por Instruado : Sinjoro P. Petit.

Jugoslava Registaro : Generalkonsulo Vilko Kuhn.

Nederlanda Registaro : Ing. J. R. G. Isbrucker.

Novzelanda Registaro : Sinjorino Patricia De Cleene.

Sveda Registaro : Rektoro D-ro Karl Söderberg.

Svisa Federala Registaro : Generalkonsulo D-ro Regli (Germanlingve).

Ĉi tiuj registaraj delegitoj bonvolis severe respekti regulon ne skribitan : mallongeco estas la spico de l'spriteco. Kelkaj el ili trovis bonajn vortojn, akceptitajn de la Kongreso kun kora aplaŭdo.

Du organizaĵoj gravaj bonvolis saluti la Kongreson ; Sinjoro Wönner, en la nomo de la Bavara Sindikataro, kaj Lerneja Konsilisto Lottner, en la nomo de la Bavara Instruista Asocio.

Kies koro estas plena, ties buŝo superbordas, oni povus diri en tiaj

manifestacioj. Kelkaj oratoroj neprevolis dokumenti sian favoron al nia afero per longega oratoraĵo, kio ja iel ĝenas, despli kiam estas en nacia lingvo. Tradukis resume la germanlingvajn paroladojn samideano Ludwig Thalmaier.

Laŭ la tradicio estas nun la vico al la reprezentantoj de la Landaj Asocioj, kiun malfermas

Aŭstria Esperantista Federacio, reprezentitaj de D-ro Halbedl, kaj S-ro Steiner Kortega Konsilisto, kiu parolis en la nomo de AEF kaj de la Internacia Esperanto-Muzeo.

Reĝa Belga Ligo Esperantista: Sinjorino J. Plyson.

Flandra Ligo Esperantista: Sinjoro F. Couwenberg.

Brita Esperantista Asocio: Sinjoro W. Gething.

Centra Dana Esperantista Ligo: Sinjoro G. Kühlmann.

Unuiĝo Esperantista Franca: Sinjoro A. Albault.

Jugoslavia Esperanto - Federacio: Sinjoro Ivo Borovečki.

Nederlanda Esperanto-Asocio "L.E.E.N.": Sinjoro W. Böttcher.

Norvega Esperantista Ligo: Sinjoro J. H. Rosbach.

Sveda Esperanto-Federacio: Sinjoro Almén.

Svisa Esperanto-Societo: Sinjoro W. Laederach.

Esperanto-Asocio de Nord-Ameriko: Sinjoro C. Chomette.

Tio estas dekdu Landaj Asocioj aliĝintaj al UEA. Salutas la kongreson la delegitoj de la Landaj Asocioj — ne-aliĝintaj —, nome de

Egipta Esperanto-Asocio: Sinjoro Nassif Isaac.

Esp. organizaĵo de Trieste: Sinjoro Lino Vitali.

Federacio de Islandaj Esperantistoj: Sinjoro Olafur S. Magnusson.

Ĉeestis ankaŭ delegito de la Esperantistoj el Orienta-Germanujo. La Kongres-prezidanto legis la salutleteron, por eviti al tiu ĉi delegito eblan ĉikanon, je reveno de la kongreso.

D-ro Kempeneers legas salutleteron de UNESKO, danke akceptitan de la kongreso.

* * *

Bonega iniciato de la Vicprezidanto de UEA, inviti D-ron Edmond Privat kaj konfidi al li la taskon fari la festparoladon. Kiu konvenas pli en nuna momento ol li, paroli al ni pri tio kio estis, estas kaj eble estos, D-ro Privat, la apostolo de la pensoj de la Majstro? Ni, malnovaj esperantistoj, nin retrovis en tiu ĉi, tiom fora tempo de l'antaŭmilito, kiam tiu ĉi ĝenevano nobla, gvidis la aferojn de nia movado. La antaŭvidon pri unufoja, unika okazaĵo, aŭdonte D-ron Privat, pravigis la fakto.

Libere parolante sen notoj, maljuniĝinta Privat ne perdis sian talenton de unuaranga oratoro, sian facilecon krei komparojn, komprenatajn tuj, sian agrablan voĉon. Li revenigas la belan epokon de la unua kongreso en Bulonjo, 1905, elvokas la memoron de Hodler, la animon de UEA. Lia voĉo altiĝas, kiam li reliefigas la sintenon de D-ro Zamenhof, rifuzanta energie akcepti materian percepton pri Esperanto. Por D-ro Zamenhof la lingvo internacia ne estas ilo por faciligi la materiajn interesojn de la homoj, sed antaŭ ĉio, la rimedo por pli bona kompreno, por krei tiun ĉi atmosferon de konkordo, necesa por certigi la pacon.

Kaj nun ekstaris antaŭ ni aŭdantoj, la vivo de profeto: kortuŝe Privat skizis la vivon, per simplaj vortoj,

de tiu ĉi viro al kiu la mondo dankas Esperanton. Kreskis la emocio kiam li rakontis pri sia lasta vizito al D-ro Zamenhof en jaro 1916, nelonge antaŭ la morto.

La unua milito forte skuis nian movadon. La dua, antaŭata de la malpermeso de Esperanto en Germanujo, ŝanĝis la mondon, sed ne detruis nian aferon. Ni devas nun rekonstrui, spite la minacon de tria milito kun ĉiuj perspektivoj de ĝisfunda detruo. Eĉ se ĉio detruigus, restus tamen iuj kaj inter ili estos Esperantistoj, kiuj ne estos forgesintaj la aferon sanktan. Doktoro Privat aludas la antaŭparolon en la kongreslibro, verkitan de Konrad Deubler kaj li citas la belan admonon: “Kiom da germanoj pro tiu ĉi sperto (de fremda okupacio) memoris je la sorto de la homoj en la landoj en kiuj antaŭe estis germana okupado kaj militaj bataloj? Kaj kiom da ili pense petis pardonon de ili? Eble nur senkulpaj kulpuloj kaj la persekutitoj de la propra lando.” La oratoro dankas la verkinton pro tiu ĉi bela signo de kompreno pri la vera situacio reganta inter Germanujo kaj la estintaj “malamikoj,” kaj li aludas pri la detruoj de Munkeno kaj de Londono, kiujn li vidis, kaj kiuj nur pravas la malsaĝecon homan.

Kiel Esperanto povos venki la barojn? Ni ne atendu miraklon, ĉar tiaj estas nur unufoje, ekzemple la kreo de Esperanto. Ĝia enkonduko estos frukto de nia laboro, de nia daŭra penado. Tiom longe, kiom la suvereneco de la ŝtatoj malebligas ĉian interkonsenton pri io tuŝanta ĉiujn homojn, ĉia kultura penado

baraktas kontraŭ tiu ĉi anomalio. Nur en la momento kiam tutmonda federalismo forigos la daŭran timon kaj kiam tutmonda parlamento decidos pri tuthomaraj problemoj, nur tiam ni rajtos atendi ion konkretan. Same kiel ni Esperantistoj ne intencas forigi la naciajn lingvojn, tiel la federalisma tutmondo ne detruos la ŝtatojn. Ne detruu la diversecon sed unuecon en la diverseco, ni volas.

La oratoro citas la problemojn kiuj devas esti solvataj. Inter ili estas unu, ne tiom rimarkita de la pensantaj homoj, nome de la instruado historia. Ĉiu popolo ja prezentas la historion laŭ propra percepto, jen blanka, ni mem, tie nigra, la malamiko. Necesas krei lernolibrojn de historio de tutmonda vidpunkto, ni dirus, de vidpunkto homara. La honorigon de herooj militaj devas kompletigi, ja eĉ anstataŭi, la diskonigo pri la faroj de la “herooj de l’paco.” Lernante pri la vivo de Julio Cezaro aŭ de Napoleono, ni memoru ke ekzistis ankaŭ aliaj herooj, kiaj estis Francisko d’Assisi aŭ hinda reĝo Azoka.

Kiel trian postulon, Privat aldonas la problemon pri raso, kaj religioj, la respekto de unu al alia. Li memorigas la gravan traktaton kiun D-ro Zamenhof siatempe sendis al la Rasa Kongreso en Londono kies konkludo estis: Ne gravas la koloro sed la nobleco de l’koro.

Ja ne estis longa distanco inter ni kaj la tempo kiam katolikoj kaj protestantoj batalis inter si. Neniu plu pensas hodiaŭ pri milito inter

Vivo de Zamenhof—de D-ro Edmond Privat
5ŝ. 4p. aŭ frankite ĉe U.E.A.

katolikoj kaj protestantoj kaj la oratoro citas kiel ekzemplon de toleremo, preĝejon en svisa urbo, kie oficas alterne katolika kaj protestanta pastroj. Pasis cent jaroj nun, de kiam Svislando havis militon pro religia kaŭzo. En proksima estonto rasa toleremo kompletigas la religian.

Kaj la kvara postulo tuŝas la senton. La nacia patriotismo en la nuna tempo jam estas antagonismo. Ĝin iam anstataŭos la sento, ke ni ĉiuj estas fratoj kaj anoj de la sama homaro.

Fingremontrante je la muroj freskon de forĝisto, D-ro Privat diras: "Vi vidas forĝistojn forĝantajn armilojn. Venos la tempo forĝi spiritojn kaj Esperanto laboru por tiu ĉi celo. Ni estu portantoj de lumo, de nova spirito. 'Pli da lumo' diris Goethe, minuton antaŭ sia morto. Laŭ la lumo sin direktas la marvojaĝanto, kaj eta lumo sur la monto faciligas trovi la ĝustan vojon al la montarano. Ni Esperantistoj havas la verdan lumon, kiu en fiziko ludas tiom gravan rolon. Verda lumo en la moderna trafiko diras: pasu. Same por ni: Vojo libera per verda lumo, Vivu la verda lumo, vivu la vero."

* * *

Entuziasma aplaŭdo kelkminuta, kiu ŝajnis ne halti, dankas la oratoron. Nefacile por la raportanto redoni ĉion kion diris D-ro Privat. Dum tuta tago la kongresanoj kaj precipe tiuj, kiuj neniam havis okazon aŭdi la unuan oratoron esperantistan, nur parolis pri tiu ĉi grandioza duonhoro, kiu metis nin en alian mondon. Koran dankon al vi, kara Doktoro Privat, vi donis novan komprenon pri nia afero.

Eksonas la orgeno. Entuziasme kantas la ĉeestantoj la himnon, tiun ĉi kredon de D-ro Zamenhof.

Ree finiĝis la Solena Malfermo de Kongreso. Gaje eliras la kongresanoj la muzeon por la tradicia fotografado.

* * *

Kulmina punkto de kongreso estas ĉiam la Malfermo; kio sekvas ĝin, jam estas afera, kio interesas nur tiun aŭ alian parton de la kongresanoj. La unuan fojon okazas kun la Universala ankaŭ la Internacia Kongreso de la Katolikoj Esperantistoj*, la 23a Katolika diservo por inaŭguri tiun ĉi 23-an kongreson, okazis dimanĉon vespere 19a horo, iom nekutima tempo.

La Somera Universitato jam fariĝas ero grava de niaj kongresoj kaj oni ne volus plu malhavi ĝin. La inaŭguro okazis dimanĉon, la 5an de Aŭgusto vespere, en la Auditorium Maximum kiu pro la cirkonstancoj ricevis la nomon "Zamenhof." Protektis la S.U. la rektoro de la Universitato, Prof. D-ro Schmaus, kiu, malhelpite ĉeesti persone, sendis reprezentanton.

Kion diri pri la prelegoj? Supervido resuma pri ili estus dezirinda, sed mankas la spaco kaj ĉia resumo estus kripligo. Estas antaŭvidate, ke la prelegoj aperos en libroformo. Pri la prelegoj kaj prelegantoj la nuna priskribo de l'kongreso enhavos apartan ĉapitron.

Lundo, 6.VIII.1951

Jam komenciĝas la laboroj. Kiel en Parizo, ankaŭ en Munkeno la laboroj de la kongreso estas plenumataj en kvar sekcioj*, kiuj kune raportos dum la sola ĝenerala kunveno, kiu okazos vendredon kaj kvazaŭ estos tegmento. La kvar sekcioj kunvenis London. Dum tuta tago kunvenis

* raporto en Okt. n-ro

fakaj organizaĵoj, eldonistoj de la landaj Esperanto-gazetoj, la esperantistaj ĵurnalistoj, la kristanoj, la blinduloj kaj stenografia konkurso. Dum vespero parolis D-ro Edmond Privat kaj Prof. D-ro Lapenna en la Somera Universitato.

Mardo, 7.VIII.1951

Du gravaj okazaĵoj: La inaŭguro de la Esperanto-Placo. La Urbestaro de München havis la brilan ideon akcepti proponon doni al placo sennoma la nomon *Esperanto*. La inaŭguro estis bonege aranĝita. Muzikistaro tramista en blua vestaĵo malfermis tiun ĉi ceremonion per brila muzikaĵo. Alparolas nin la Urbestro de München, esprimante la kontentiĝon pri tio, ke ni venis al Munkeno, por nia 36-a kongreso. Bonegaj vortoj kutimaj en tia cirkonstanco. Tradukis D-ro Ziegler por la ĉeestantaro.

Falis la tukoj kiuj kovris la belajn ŝildojn kun la vortoj

ESPERANTO — PLATZ

Senhalta aplaŭdo de la multnombra ĉeestantaro, inkluzive de ne malgranda aro de enloĝantoj scivole alkurintaj.

La Urbestron sekvis la Kongresa Prezidanto D-ro Kempeneers kaj en koncizaj vortoj gratulis la Urbestaron pro la honoro farita al nia afero. Sekvis Hans Jakob, (germanlingve) gratulante la Urbestaron por la bela gesto kaj speciale akcentas, ke oni elektis placon en plej bona situacio, kontraŭ la monumento de la Bavaria, ĉe la kruciĝo de stratoj honore je Franz Schubert, de Mozart kaj de la pentristo Kobell, ĉiuj kondukantaj al la Bavaria-Ring. Li aludas, ke en Munkeno aperis en

1891 la unua bona Esperanto-gramatiko por germanoj, verkita de L. E. Meier, pioniro de nia afero. Emfaze la parolanto insistas, ke Munkeno fariĝu la ĉefurbo de la Esperanto-Movado en Germanujo.

La ekzemplo de Munkeno estas imitinda. Ni nun posedas precedenton por ke oni proponu en Oslo, doni la nomon de nia lingvo al strato aŭ placo.

Kunsidoj de kelkaj fakaj organizaĵoj pri kiuj estos resuma informo, same kiel por la sekcioj. Sed vespere ni ĉeestis en la "Hofbräuhaus," en la salonego, la

Kongresan Balon

Kiel direktanto de tiu ĉi tiom ŝatata ero de nia kongreso funkciis la simpatia Michl kaj por ke ĉiuj lin konu, sekvu Ehbauer, la familia nomo. Esperantisto de multaj jaroj kaj libera artisto, li plenumis sian rolon majstre kaj ne sen ŝvito.

Gajega atmosfero. Grandan sukceson la direktanto havis per la Gvardio, knabinoj en (fantaziaj) uniformoj ekzercantaj laŭ melodio de ŝatata marŝo je la honoro de la redaktoro de ESPERANTO. Ironie la organizanto de la balo deklaras, ke tiu ĉi gvardio estas la resto de la estinta armeo.

Al la komandantino de la trupo, la redaktoro de ESPERANTO transdonis sub grandega aplaŭdo florbukedon. Sed ne estas ĉio! Sekvis io, kio nin krevigis pro ridado. Aperis Zebro kaj "dompteuse" en alloga robo. La movoj kaj saltoj de l'Zebro, ĝiaj kaprioloj kaj grimacoj, ĝia provo kisi samideaninojn estis tutsimple eksplodigaj. La raportanto jam vidinte multegon da similaj aranĝoj ne memoras esti tiom ridinta kiel ĉi-vesperon. Je la fino subite la

Zebro perdis kruron kaj alian kruron kaj ekstaris antaŭ ni du artistoj, kiuj dum duonhoro kapablis ludi tiun ĉi akrobataĵon.

Tri knabinetoj vestitaj kiel "Munkena Infaneto" (Münchener Kindl) aminde deklamis versaĵon kaj ludis harmonikon tiom lerte kaj sperte, ke ĉiuj estis ravitaj.

La Kongreso dancas, jen la gvida vorto por la vespero. Kaj la kongreso sekvis ĝin ĝis matenruĝo, escepte la raportanto, kiu malaperis je konvena horo por esti preta venontan tagon. Nenio estas pli malfacile elportebla, ol serio de belaj tagoj (kaj vesperoj).

Merkredo, 8.VIII. 1951

La kongresa kalendaro indikas, Belartan Konkurson, prelegojn de la Somera Universitato, aron da fakaj kunsidoj, oratoran konkurson kaj

dum la vespero ree en la Hofbräuhaus, okazigon de

Arta vespero

ree sub la gvida mano de nemankebla Ehbauer. Nu mi legis la programon tripartan kun entute naŭ eroj, melodioj el Wagner operoj (Tannhäuser), Gral-rakonto kaj la Halo-arion el sama opero prezentitaj de profesiaj artistoj. Bukedo de popol-kantoj, solo-kantoj (Rozo en erikejo, Kara Kentuckyland', Bovoĉaro), luditaj kaj kantitaj de orkestro Waelde kaj vira ĥoro Biedermann. Sed la plej grandan sukceson havis la skeĉoj en kies prezentado partoprenis nia ĉefhumoristo Raymond Schwartz. La programon, kiu enhavis ankaŭ dancojn de dancistinoj, finis *Saluto el Munkeno*. Senutile diri, ke la vespero daŭris ĝis mateno laŭ la moto: La kongreso dancas.

vidu paĝon 239

vidu paĝon 239

B O N V E N A D O N A C O

je Kristnasko — je datreveno — kiel dankesprimo
(ĉar al kiu ne plaĉas detektivromano?)

MORTO DE TRAJNO

de FREEMAN WILLS CROFTS

Tradukita de MASON STUTTARD
tole bindita, kun plurkolora polvŝirmilo
256 paĝoj — 9ŝ., aŭfranko 6p.

Eldonita de

THE ESPERANTO PUBLISHING CO. LTD.

Mendu ĉe enlanda librovendejo aŭ ĉe

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

Ĵaŭdo, 9.VIII.1951

Uff ! tago de ripozo, diras iuj, tago de laborebleco, opinias la raportanto. Nome, okazis la tuttaga ekskurso al Lago de Starnberg, kun la vizito al reĝa kastelo. La vetero ne estis favora dum tiu ĉi tago, pluvis kaj iĝis tre freŝa. Granda parto de la kongresanaro partoprenis la ekskurson kaj ne estis facila tasko por la prezidanto de la LKK atenti ĉies dezirojn kaj kontentigi ĉiujn.

Dum la vespero la Komitato de UEA kaj kelkaj eminentuloj estis gastoj de la Urbestro de Munkeno. La ĉefurbestro Thomas Wimmer salutis, afable parolis pri nia afero, kiun li kredas de granda utilo, kaj prezentis al la invititoj bildon de la damaĝo kiun suferis la urbo, ornamitan per multaj ciferoj. Tradukis D-ro Ziegler. Lin respondis la prezidanto D-ro Kempeneers, kiu post la kutima danko, aludas sian vojaĝon al la kongresurbo en aŭtomobilo, dum kiu li havis okazon vidi la detruitajn urbojn germanajn, en Rejnlando kaj rimarkigas ke saman, iafoje eĉ pli grandan damaĝon suferis aliaj urboj en Belgujo, Francujo, Nederlando, Britujo. Nia tasko laŭ li, devas esti labori pli forte por la malebligo de tia katastrofo kiun ni trapasis. Liajn parolojn interpretis D-ro Ziegler en germanan lingvon. La ĉeestantoj vigle dankas la oratorojn, kaj same vigle ŝatis la bonegan menuon, ne luksan sed agrablan. La gastoj sin enskribis en la Honora Libro, kie aparta paĝo estas dediĉita al la 36-a Universala Kongreso de Esperanto.

Vendredo, 10.VIII.1951

Alproksimiĝas la fino de la kongreso. Tro rapide pasis ĉi tiuj belaj tagoj, kaj jam iuj sin preparas por

foriri. La hodiaŭa tago staras sub la signo de la

Ĝenerala kunsido de l'kongreso

kie estas prezentataj la raportoj pri la konkursoj kaj la sekcioj. La tagordon konigis la prezidanto, senrezerve aprobitan de la kongresanaro. La Auditorium Maximum estis duone plena, ĉirkaŭ kvincent personoj bonvolis honori la laborojn de la organizantoj de ambaŭ kongres-eroj.

Prof. Sirk, laborema kaj vigla kiel ĉiam, transdonis la salutojn al la kongreso de la Teknika Altlernejo de Vieno (Technische Hochschule) kaj atentigas, ke estas tiu ĉi altlernejo kiu unue metis nian lingvon en sian instruplanon antaŭ 34 jaroj. (Aplaŭdo)

La vico estas nun al la raportantoj pri la konkursoj, belarta kaj oratora. S-ron Reto Rossetti ne povintan ĉeesti la kongreson, anstataŭas Profesoro Laurat, kiu koncize raportas pri la belarta konkurso. Gajnintoj de la premioj estas :

Poezio originala :

1. { Božidar Vanĉik, Jugoslavujo
(*Nokto en ĝardeno*).
Vincenzo Musella, Italujo (*Nokta paŝo*).
2. William Auld, Britujo (*Anna*).
3. William Auld, Britujo (*En Mia Mio*).

Poezio traduka :

Pastro J. Dinwoodie kaj William Auld.*

Prozo originala :

Lao Tze en Londono (novelo) : T. K. Slade, Britujo (dua premio aljuĝita)

Teatraĵo originala :

La amo ne konas landlimojn : F-ino E. de Burgh Daly, Britujo (dua premio aljuĝita).

* detaloj en Okt. n-ro

La oratoran konkurson partoprenis ses personoj, kiel raportas Estrarano Lapenna. La du unuajn premiojn gajnis Nicola Minnaja kaj Sinjoro Albault, kaj la duan premion Sinjoro Uhde, la direktoro de la gazetara servo. Trian premion oni ne disdonis. La premion por fraŭlinoj gajnis F-ino Hoffmann. La ĉeestantoj varme aplaudas la premiitojn, post kiam la prezidanto esprimis la dankon al ĉiuj, kiuj sin okupis pri tiu ĉi interesa ero de niaj kongresoj. Specialan dankon li direktas al Prof. Lapenna, la animo de la afero.

Post tiu ĉi ĝojiga programero venas alia, malpli ĝojiga, sed necesa. Temas pri la kotizoj de UEA por la jaro 1952. Mallonge la prezidanto informas pri la situacio, kaj donas la parolon al la estro de la Komisiono pri Financoj, Sinjoro Gething. Evidentiĝas do, ke la prezoj senbride kreskas, ke altiĝas preskostoj, papero, afranko, dume niaj kotizoj restis la samaj, **malaltigitaj** en 1939. Fakte la nunaj kotizoj estas ja malpli altaj ol tiuj en 1920, kiam UEA enkondukis la nunan sistemon de MJ, MA, MS (Membro kun jarlibro, Membro-Abonanto kaj Membro-Subtenanto). Ili estis en 1920, 5, 12.50 kaj 25 fr. svisaj. Se ni nun altigas ilin, ni praktike ricevos la saman sumon kiel en 1920. La Komisiono Financa do proponis, ke oni akceptu la jenan novan tarifon: MJ: 7/6 ŝil.; MA: 20 ŝil.; MS: 25 ŝil. Estas ĉiam tikla afero demandi, ke oni akceptu prezaltigon, sed je la honoro de la ĉeestantoj estu dirite, ke oni komprenas la neceson. Je la voĉdono la kongresanoj aprobis la decidon de la Komitato. Ekde 1952 validas la novaj kotizoj.

Pri la sekcioj raportas sinsekve Sinjoroj Kennedy, Lapenna, Laurat

kaj Petit*. La kongresanaro atente aŭskultis la bone prezentitajn raportojn pri:

Esperanto en la edukado de plenkreskuloj.

Esperanto en scienco kaj tekniko.

Esperanto en internaciaj intelektaj interŝanĝoj.

Esperanto en la internacia trafiko kaj komerco.

La prezidanto dankas al la estroj de la sekcioj por ilia laboro, same kiel la kongresanoj danke aplaudas.

La prezidanto donas la parolon al Estrarano Hans Jakob, komisiita prezenti proponon de la Financa Komisiono pri la atendebla deficito en la nuna jaro. Li klarigas la situacion, ŝuldatan al nova prezaltigo kaj malricevo de kotizoj el kelkaj landoj. La Komisiono esploris la eblecon redukti iujn kostojn kaj notis diversajn sukcesojn. Sed tio ne sufiĉas. La deficito atendebla estos 400 pundoj, kio respondas al 5000 germ. markoj kaj proksimume sama sumo en svisaj frankoj.

Estrarano Hans Jakob nun klarigas proponon de la Komisiono fari monkolekton tie ĉi. Li aludas, ke la dumil kongresanoj elspezis meze 200 GM por persono, ke sekve 400.000 GM estis elspeditaj. UEA bezonas urĝe unu procenton de tiu ĉi sumo, jen la problemo!

Elokvente la parolinto admonas la kongresanojn, oferi ion por forigi la zorgojn de la Estraro kaj ankaŭ de nia Ĝenerala Sekretario. Se ĉiu donas minimume unu markon, jam parto de la mono bezonata troviĝas. Li petas la kunhelpon de kelkaj samideaninoj kun ĉarma rido por kolekti la monon. La helpo venis kaj la kolektado, kontrolita de du samideanoj, Piatti kaj Link,

* raportoj en Okt. n-ro

rezultigis sumon de rondcifere 375 GM. La parolinto kore dankas al la bonvolaj donacintoj kaj al la ĉarmaj helpantinoj.

Lasta punkto : Kritikoj. Estrarano Lapenna atentigas, ke estas nun la momento informi nin pri ĉio kio ne estas bona, ke oni kritiku, ĉar senca kritiko sanigas. Neniu sin anoncas. La prezidanto demandas, ĉu oni daŭrigu, aŭ ĉu oni fermu la diskuton je la 12-a horo. Li voĉdonigas kaj ĉiuj konsentas, ke oni finu je tagmezo. Sekvis aro da informoj kaj la kunveno finiĝis je la 12-a horo.

La Somera Universitato

Konvenas tie ĉi rememorigi kelkajn faktojn. En jaro 1925, okaze de la Ĝeneva Kongreso, D-ro Privat iniciatis kaj organizis la unuan Someran Universitaton kun prelegoj sciencaj de fakuloj-profesoroj. La iniciatinto, kiu nun ĉeestas la kongreson kaj mem prelegas, rajtas esti kontenta pri la evoluo de sia spirita infano. La Somera Universitato fariĝis neforigebla parto de niaj kongresoj.

Nunjare prelegis ree konataj samideanoj, profesoroj universitataj. Profesoro Canuto, Parma, montris la problemojn jurajn kaj jurmedicinajn, kiuj ĉirkaŭas la tielnomatan *Eŭtanazion* (la mortigo laŭ deziro de malsanulo).

Profesoro Waringhien, Paris, legis pri temo tuŝanta nian aferon, nome *la ideologia dramo de L. L. Zamenhof*. Ni ja sciiĝis el la "Leteroj de L.L.Z.", pri la animkonfliktoj de la kreinto de Esperanto, profeto de Bona Volo en efektiva senco de l'vorto.

Edmond Privat, en sia ĉarma maniero faris komparon inter "*Tolstoj kaj Gandhi*," la rilaton de ambaŭ distance tiom disigitaj herooj de l'ne-perforto.

Temperamenta fortvoĉa Profesoro Lapenna klarigis temon tre aktualan, *Fundamentaj Elementoj de Federacia Ŝtato*.

Prof. Laurat bonege prelegis pri "*Esperanto kaj Mondcivilizo*."

Pri "*Giuseppe Verdi*", la eminenta komponisto itala, prelegis D-ro Vincenzo Musella. "*Kiamaniere oni povas determini la nombron de la molekuloj*," treege scienca temo, estis klarigita al la aŭdantaro de nia ŝatata Viena Profesoro, D-ro Hugo Sirk. La lasta preleganto, Rektoro Karl Söderberg, klopodis proksimigi la aŭdantaron al *la idea mondo de August Strindberg*.

Profesoroj el ses landoj kaj kvin diversaj lingvoj, prelegantaj en unu sola idioma kiu ne estas fremda al ili, ĉu tio ne estas ia eksterordinara fakto? Kaj la prelegantoj mem, spertuloj de sia fako kaj samtempe penetritaj de l'Esperantismo, nova scienco, pri kio eble iam estos katedro universitata ankaŭ en Munkeno.

Estus dezirinde ke la prelegoj ne estu forblovitaj de l'vento, sed ke ili aperu iam en leginda libro.

Ĉu necesas ripeti, ke ĉiuj prelegintoj rikoltis entuziasman dankon aplaŭdan. La kongresanoj, kiuj ne povis ĉeesti unu aŭ plurajn prelegojn, perdis ion valoran. Dankan memoron al Edmond Privat kaj gratulon al la nomitaj profesoroj-prelegintoj.

Somera Universitato : Malmö 1948

4ŝ. 3p. aŭ frankite ĉe U.E.A.

Sabato, 11.VIII.1951

Kongresfino. Melankolia sento ek-kaptas nin kaj nur la scio pri venontjara renkontiĝo konsolas. La multaj rilatoj amikaj inter la Esperantistoj estas unu el la neforigeblaj faktoj de nia movado. Kiu unuan fojon ĉeestis kongreson ne forgesos tion, eĉ se lin la sorto favoras je pli ofta kongresvojaĝo.

Precize je la deka horo, D-ro Kempeneers ekkomencas. Donas la parolon al Estrarano Kennedy por la raporto pri la fakaj kunvenoj, kun resolucioj, kiu skizis la laboron de la jenaj fakoj: ĵurnalistoj, ILEI, Tutmonda Junular-Organizo, Kristana Esperantista Ligo Internacia. La kongreso aprobas tiun-ĉi raporton.

Komitatano Canuto raportas pri la laboroj de la Komitato de UEA dum la kongreso*. La Komitato anoncis, ke ĝi decidis, nomi

D-ron Edmond Privat,
Honora Prezidanto de UEA

kaj kiel Honora Membro

Sinjoron Saldanha Carreira,
Portugalan Ĉefdelegiton de UEA

kiel signon de dankemo pro faritaj laboroj. (Tondra aplaŭdo, senfina).

Estrarano Lapenna komunikas la tekston de deklaro kaj la kongreso ĝin aprobas:

Deklaracio

pri la celo de la Esperanto-Movado

La reprezentantoj de la Esperanto-Movado el 40 landoj, kunvenintaj en la 36-a Universala Kongreso de Esperanto en Munkeno, Aŭgusto 1951, akceptas la jenan deklaron:

La celo de la Esperanto-Movado estas plena apliko de la Internacia

* raporto en Okt. n-ro

Lingvo Esperanto en ĉiuj sferoj de la internacia vivo kaj por ĉiuj internaciaj rilatoj.

El tia vasta uzado de la Internacia Lingvo logike rezultas:

1. *altiro de pli larĝaj popoltavoloj al aktiva partopreno en la internacia vivo;*
2. *progresigo de la scienco kaj plimultigo de la intelektaj interŝanĝoj en internacia kadro;*
3. *plifirmigo de tuthoma solidareco kaj rapidigo de la unueciĝo de la homaro.*

* * *

La prezidanto invitas la unuan premiiton en la Belarta Konkurso deklami versaĵon de li verkitan: Samideano Musella laŭtlegas du poemojn originalajn kaj la fortega aplaŭdo de la kongreso pruvis al la verkinto, ke li sciis tuŝi la korojn de la aŭdantaro. Estrarano Lapenna konkludas pri la konkursoj kaj insistas, ke oni interesiĝu je ĉi tiuj konkursoj, invitas bonulojn pretajn donaci premiojn por la konkursoj de la 37-a Kongreso.

Estrarano Hans Jakob konigas la tre bone pripensitan gazetarinformadon de la Itala Esperantista Federacio. Nete aranĝitaj informoj iris ĉiutage al la itala gazetaro, pretaj por doni al la tipografisto. Li gratulas la lertan organizanton de tiu ĉi servo Samideanon Gian-Carlo Fighiera kaj invitas aliajn Landajn Asociojn sekvi tiun-ĉi ekzemplon.

Estas la dekunua horo . . . ni alproksimiĝas la finon. Prezidanto Kempeneers leviĝas kaj unue esprimas la dankon al la bonvolaj kunhelpantoj, LKK, precipe ties prezidanton D-ron Ziegler, al ĉiuj oficistoj bonvolaj, al la organizantoj de la S.U., al la prelegintoj, kaj al la

estroj de la sekcioj. Apartan dankon la prezidanto direktas al Profesoro D-ro Sirk, Vieno, kiu sindone klopodis por la sukcesigo de la SU. (Vigla aplaŭdo)

La parolvico estas al D-ro Ziegler kiu per kelkaj varmaj vortoj dankas al ĉiuj kiuj kunhelpis al la sukceso de la 36-a. Li estas konvinkita, ke tiu-ĉi kongreso pri kiu oni tre atentis, alportos siajn fruktojn. (Aplaŭdego)

Sinjoro Rosbach ripetas la inviton de la Norvega Ligo por la 37-a Kongreso en Oslo kaj ekkrias: Ĝis revido !

Stariĝas Estrarano Oliver por varme kaj sincere danki la prezidanton de la Kongreso, D-ron Kempeneers por la sperta gvidado de l'aferoj. Ni ĉiuj en la Komitato, li diras, scias alte taksi la kompetentecon, la trankvilon kaj la decidpovon de nia kongresprezidanto,

kaj ni estas feliĉaj pri la senmalhelpa irado de l'aferoj. El la viglaj kaj iafoje varmegaj diskutoj en la Komitato, kie kunpuŝiĝas la opinioj kaj fine kristaliĝas io konkreta, la prezidanto sciis en decida momento trovi bazon de interkonsento kaj de kompromiso. Se ni nun dankas al li, ni ne forgesu la edzinon, Sinjorinon Kempeneers, kiu kun afabla mieno akceptis kaj elportis la foreston de la edzo en kunsidoj. Al tiu ĉi danko li aldonas tiujn al la edzinoj de ĉiuj niaj aktivuloj en la kongreso, same tolerantaj la foreston de la edzo. (Vigla aplaŭdo)

Post tiu ĉi ĝenerala dankado, la prezidanto eldiras sian ferman paroladon.

Alpaŝas nia sveda fortvoĉa komitatano Einar Dahl kaj entonigas la himnon, entuziasme kantitan de la tuta kongreso. Munkena kongreso jam estas historiaĵo.

Ferma parolado de D-ro Kempeneers

Estimataj Sinjorinoj kaj Sinjoroj,

Jen ni alvenis al la fino de tiu ĉi 36-a Universala Kongreso de Esperanto.

Multaj el vi venis ĉi tien kun iom necertaj sentoj ; de siaj kontaktoj kun la germana popolo, kaj la germanaj esperantistoj speciale, ĉiu tiros siajn personajn konkludojn.

La Estraro de Universala Esperanto-Asocio ne akceptis senhezite la inviton aranĝi en Munkeno la 36-an Universalan Kongreson. Ĝi sciis, ke la okazintaĵoj inter 1933 kaj 1945 estis ankoraŭ tro freŝaj en la memoro, kaj ni komprenis tiujn, kiujn tiuj sentoj tenis for de ni.

Dum mia restado mi vizitis Dachau, tiun supron de la homa turmento. En ĝi sidis pluraj esperantistoj, inter ili nia jugoslava samideano Kozlevĉar, kiun ni ĝoje vidas inter ni. Malgraŭ la teruraj vivcirkonstancoj, li fidis al nia idealo, kaj gvidis en la koncentrejo plurajn Esperanto-kursojn. En sia nuna stato la tie aranĝita elmontro memorigas digne, objekte, kiel oni vivis kaj mortis en Dachau. La kvar bruligaj aparatoj staras tie kiel sendanĝeraj bakfornoj. En la korto staras la pinarbo al kies branĉoj oni pendigis la ekzekutitojn, la montetoj kontraŭ kiuj oni mortpafis ilin. En iu angulo, malgranda amaso da cindro estas ĉio, kio restas de 20.000 homoj,

iam ĝoje vivantaj, iam pene suferantaj. Kun Hans Jakob mi longe meditis en tiu historia loko. Kaj ni venis al iu sama konkludo :

Estas maljuste respondeci la germanan popolon entute pro tiuj abomenindaĵoj. En ĉiu lando, ankaŭ en la mia, en Belgujo, troviĝas fihomoj.

La koncentrejo en Breendonck estis tiel terura, ke por ĝia enloĝanto transportado al Buchenwald estis kiel eliro el la infero.

Ne, Estimataj Gesinjoroj, la veraj kulpuloj estas tiuj, kiuj senkatenigis la brutajn instinktojn, kiujn ni ĉiuj heredis de niaj prapatroj, iam vivintaj en kavernoj antaŭ kelkdeko da jarmiloj ; ili metis en la senliman kaj senrespondecan povon de kelkaj krimuloj amasojn da malfeliĉaj homaj estaĵoj, kiujn ĉi tiuj traktis same senkonscie, kiel infano, kiu kaptinta muŝon, eltirus de la malfeliĉa besteto unu piedeton, unuflugilon post la alia, nur por vidi tion, kio okazas.

Pluraj el tiuj gvidantoj trovis sengloran finon, sed ankoraŭ restas multaj de tiuj homoj, pretaj senkatenigi la inferajn fortojn.

Mi citas la vortojn de Schiller, skribitajn ĉe la enirpordo de Dachau :

La digneco de l'homaro estas donitaj en viajn manojn ;

Protektu ĝin !

Ĝi falas kun vi, kun vi ĝi leviĝas !

Ni, Esperantistoj, kiujn gvidas tiu nobla sento de amo al la homaro, tiu verda lumo, kiun tiel bele difinis D-ro Privat en sia elokventa festa parolado, ni havas la devon helpi en la kontraŭbatalo al tiuj malaltaj kaj malnoblaj sentoj.

Ni devas laŭpove teni fermita la inferan kavernon en kiu ili estas enŝlositaj, en la fundo de nia animo, en kiu ilin katenas nia edukado, nia kulturo, nia konscienco.

Per senĉesa laboro sur nin mem, ni plibonigu nian edukon ; ni apliku en ĉiuj cirkonstancoj de la vivo, kaj speciale en niaj rilatoj inter samideanoj, tiujn regulojn de ĝentileco, kiuj eble iom elmodiĝis, sed tamen tiom pliagrabligas la kunvivadon.

Ni pligrandigu nian kulturon, unue pliperfektigante la konon de nia lingvo per ĉiutaga parolo, skribo kaj legado. Por vi, Esperantistoj, verkas niaj aŭtoroj, por vi presas librojn niaj eldonistoj. Mi ĝoje aŭdis la opinion de D-ro Privat, ke la lingva nivelo de niaj kongresoj multe plialtiĝis dum la 20 lastaj jaroj.

Ni plifortigu nian konscion per senĉesa klopodo sur nin mem.

En sia kortuŝa parolado D-ro Privat montris al ni kian moralan forton havis Gandhi, tiu malgranda, malgrasa, malforta homo, nur pro la nobleco de sia konscio kaj de siaj sentoj.

Se ni ĉiuj, en ĉiuj cirkonstancoj de la vivo montras nin noblaj kaj senriproĉaj, ni altiros al niaj vicoj multajn homojn kun altaj idealoj. Tiel ni helpas al la disvastigo kaj progreso de nia kara Esperanto-movado.

Kun tiu espero mi fermas la 36-an Universalan Kongreson de Esperanto.

Ĝis revido en Oslo !

Gravaj Rekomendoj de la Kunveno de la Propaganda Fakto

Malofte dum niaj kongresoj oni havas okazon vidi tian kunvenon. Kvankam la tagordo estis kaj riĉa kaj tre grava, tamen la tuta laboro estis finita en iom pli ol du horoj. Prezidis Prof. D-ro Lapenna, Estrarano de U.E.A. pri ĝenerala propagando (nun informado), protokolis Ivo Borovečki. Ĉeestis la rajtigitaj reprezentantoj de la germana, svisa, jugoslava, belga, nederlanda, brita, itala, dana landaj asocioj; krome la reprezentantoj de I.L.E.I., T.J.O., I.S.A.E., de diversaj informaj servoj kaj kelkaj individue invititaj esperantistoj.

Ne okazis raporto, ĉar riĉa dokumentaro kun raporto estis jam antaŭ pluraj monatoj dissendita al ĉiuj interesatoj. La proponoj estis mallongaj kaj precizaj: ne estis necese longe klarigadi, ĉar la partoprenintoj jam antaŭe profunde trastudis la problemojn.

La kunveno konstatis, ke en la lasta jaro estas farita nova serioza progreso sur kampo de disvastigo de la lingvo. La ĉeestantoj interkonsentis pri la fundamentaj principoj en nia informado kaj pri evito de kelkaj eraroj (interalie: eviti estontece, precipe en la neesperantaj tekstoj, la vorton mem "propagando").

La kunveno decidis rekomendi al U.E.A. starigi apartan Centron de Dokumentado kaj Informado, kaj la Komitato, en unu el siaj kunsidoj, fakte akceptis tiun proponon kaj komisiis D-ron Lapenna komenci la laborojn. La kunveno plue rekomendis al la landaj asocioj: fondi apartajn informajn centrojn, se tio ankoraŭ ne okazis; organizi komence de la laborsezono Esperanto-semajnojn kaj tuj post tio malfermi novajn kursojn; starigi gazetarajn servojn ankaŭ en la landoj, kie ili ankoraŭ ne ekzistas; doni subtenon al la klopodoj fondi apartajn studentajn grupojn, precipe en la universitatoj, kie oni instruas Esperanton. Estontece la diversaj gazetaraj servoj interŝanĝu siajn informojn kaj spertojn. La nova Centro de Dokumentado kaj Informado de U.E.A., unuflanke, entreprenados diversajn paŝojn ĉe internaciaj organizaĵoj kaj, aliflanke, harmoniigos kaj kunligos la tutan aktivecon faratan en diversaj landoj kaj medioj sur tiu ĉi kampo. Espereble tia pli intima kunlaboro kaj pli taŭga dispartigo de la taskoj donos ankoraŭ pli bonajn fruktojn en la estonteco.

I. L.

Fina laŭlanda statistiko de la kongresanoj (11.8.51)

Alĝerio 1, Argentino 1, Aŭstralio 2, Aŭstrujo 43, Belgujo 39, Brazilo 4, Britujo 226, Bulgarujo 3, Ĉeĥoslovakujo 4, Danlando 45, Egiptujo 6, Finnlando 19, Francujo 260, Germanujo 797, Hispanujo 8, Indonezio 1, Irano 1, Irlando 3, Islando 1, Italujo 84, Izraelo 1, Jugoslavujo 19,

Kubo 1, Litovujo 1, Maroko 6, Nederlando 62, Norvegujo 45, Novzelando 1, Polujo 7, Portugalujo 1, Rusujo 1, Sarlando 15, Sudafriko 1, Svedujo 217, Svislando 30, Triesto 4, Turkujo 1, Urugvajo 1, Usono 14, Venezuelo 1. Sumo 1,977 el 40 landoj.



Tra la Mondo Esperantista



Andoro

Turismo : Dank'al la laboro de nia delegito, S-ro Travesset, la Turisma Sindikato nun havas Esperantan Fakon. Adreso : Sindicat d'Iniciativa de les Valls d'Andorra, Andorra la Vella, Andoro.

Aŭstralio

Internacia Ekspozicio de Infanaj Artverkoj : La 10an ĝis la 12an de Septembro en la Urbdomo de Sydney ni montros nian plenan ekspozicion konsistantan el preskaŭ sesmil desegnaĵoj kaj manfaraĵoj el la tuta mondo. Kun ni kunlaboros multaj oficialaj kaj duonoficialaj instancoj, inkluzive de la Ministerio por Edukado en New South Wales, k.a.

Poste nia ekspozicio veturos, sub la aŭspicioj de la Ministerio por Edukado kaj de la Nacia Biblioteko en la Kamparo, kaj oni elmontros ĝin en la ĉefaj urboj dum multaj monatoj. (E. W. Chandler, Sydney Esperanto-Societo).

Danlando

Oficiala dana stipendio por studi Esperanton en italaj lernejoj : Dum oktobro instruistino s-ino Roma Thorsen (Kopenhago) vojaĝos al Italujo por studi lernejojn, kie oni instruas Esperanton aŭ uzas ĝin por instruaj celoj. Direkcio de Kopenhagaj lernejoj tiucele donis 600 kr. (ĉ.£30) por ebligi la vojaĝon.

Francujo

ISAE : Membroj de la Franca sekcio de ISAE fondis apartan klubon por progresigi pli taŭge la celojn de ISAE. La ĉefa celo estas disvastigi Esperanton en la intelektulaj kaj studentaj medioj, kaj utiligi Esperanton por ĉiuj branĉoj de la scienco kaj arto. Komitatanoj estas Profesoroj Lapenna, Laurat, Waringhien, Gen. Bastien, Ing. François kaj Naoumoff, Adreso : Akademia Esp. Klubo ĉe Ing. Naoumoff, 3 Av. Gén. Leperrine, Paris XII.

Lourdes : Grupo fondiĝis en la pilgrim-urbo. Informoj ĉe S-ro Abbadie, café de la Gare (antaŭ la fervoja stacio).

Hispanujo

Nacia Kongreso okazis en Tarrasa, 28–30 julion. Plena raporto ne alvenis, sed ŝajne ĝi bone sukcesis. La Kuracista Esperanto-Asocio (filio de la Hispana Esperanto-Federacio) aranĝis Esperantan Medicinan Kunvenon en Barcelona la 27-an de julio.

Italujo

La 23-a Itala Kongreso okazos 9–11 septembron en Pisa. Vizitantoj estos bonvenaj. Sekretario de la Kongresa Komitato, S-ro Roberto Lenzi, Via della Faggiola 5, Pisa, Italujo.

Izraelo

2-a Izraela Kongreso okazis en Tel-Aviv 23–24 majon. Partoprenis

pli ol 100 geesperantistoj. Oni aranĝis ekspozicion de interesaĵoj esperantaj, malnovaj bildoj, libroj, k.t.p. Oni inaŭguris en la nova kolonio Nov-bialistoko straton je la memoro de D-ro Zamenhof.

Japanujo

Kuracistoj : 1-5 Aprilon okazis en Tokio la 13-a Tutjapana Medicina Kongreso kun proks. 18,000 partoprenantoj. Ĉe ĝi la Japana Esperantista Medicina Asocio aranĝis kunvenon, kiun ĉeestis 33 samideanoj. Ĝi bone sukcesis, kaj oni ankaŭ anoncis pri la baldaŭa reapero de *Medicina Revuo*. Kuracistoj kiuj volas kontakti J.E.M.A., skribu al D-ro Hideo Shinoda (U.E.A. del.), Kasumicho, Yamagata-shi.

Jugoslavujo

15a *Jugoslava Kongreso* okazis komence de Julio kun proks. 500 partoprenantoj, inter kiuj estis vizitantoj el Anglujo, Aŭstrujo, Nederlando kaj Svedlando. La registaro sendis al la kongreso ministron de la kulturklerigaj aferoj Boris Zicherl. Dum la labora parto de la kongreso okazis 13 fakkunsidoj kaj la jarkunveno de J.E.F. Pri la kongreso bone raportis la gazetaro kaj radiostacio : krome oni filmis kelkajn kongresajn aranĝojn.

ENIGMA KONKURSO

Gajnis la premiojn post kontrolo de la 57-a konkurso : S-ro E. Windeballe (Dan) 166, D-ro W. Manders (Ned) 163, S-ro O. Fuchs (German) 163 p.

Post kontrolo de la 58-a konkurso : F-ino J. J. v. Thiel (Ned) 168, S-ro Chr. F. W. Slijper (Ned) 168, S-ro I. Ekström (Finn) 168 p.

Post kontrolo de la 59-a konkurso : S-ro R. Laine (Franc) 176, S-ro J. Soyeur (Belg) 173, S-ro H. Evers (Ned) 165 p.

Nov-Zelando

Kongreso de N.Z.E.A. okazos ĉe Tauranga la 29 decembron 1951 ĝis 2 januaron 1952. Salutleterojn k.t.p. oni sendu al la Kongresa Sekretario, P.O. Box 5120, Wellington, Nov-Zelando.

Usono

Radio : Okazis disaŭdigo de New York la 12-an de junio, kiam oni intervjuis D-ron Solzbacher, la Prezidanton de E.A.N.A. Ni gratulas, sed esperas ke venontan fojon la stacio (Voice of America, New York 19, N.Y., Usono) povos doni averton sufiĉan por ke ni ĉiuj aŭskultu.

Internacia Konkurso 1951

Stato je 28a de Julio 1951

Lando	Kvoto	Poentoj	%
1. Maroko ..	400	640	160.0
2. Brazilo ..	2500	3438	137.5
3. Portugalujo	600	805	134.2
4. Finnlando ..	2000	2640	132.0
5. Sud-Afriko ..	250	330	132.0
6. Germanujo ..	2400	3160	131.6
7. Italujo ..	1700	2050	120.6
8. Izraelo ..	300	360	120.0
9. Norvegujo ..	1400	1549	110.6
10. Japanujo ..	800	875	109.4
11. Belgujo ..	2100	2293	109.2
12. Urugvajo ..	250	265	106.0
13. Svislando ..	1400	1430	102.1
14. Britujo ..	12000	12156	101.3
15. Hispanujo ..	1100	1095	99.5
16. Svedlando ..	5300	5211	98.3
17. Danlando ..	2800	2645	94.5
18. Francujo ..	5700	5381	94.4
19. Aŭstralio ..	900	820	91.1
20. Kanado ..	250	215	86.0
21. Nederlando ..	5000	4240	84.8
22. Nov-Zelando	800	665	83.1
23. Argentino ..	800	640	80.0
24. Usono ..	3000	2367	78.9
25. Irlando ..	250	180	72.0
26. Aŭstrujo ..	1000	625	62.5
27. Kubo ..	250	145	58.0
28. Islando ..	500	180	36.0

Nia felietono :

La Alaska Stafeto

F. Omelka

VII. Inter la vivo kaj morto

JAM de tiu momento, kiam venis al Nome la sciigo, ke la stafeto ekveturis, la loĝantoj de la urbo respiris. Ili sciis, ke oni ankoraŭ ne venkis. Ili sciis, ke la ĉefa lukto kun la mortinsida malsano nur ekestas. Sed tamen la malespero cedis al la espero.

Doktoro Welch maljuniĝis en tiuj kelkaj tagoj almenaŭ je dek jaroj. Ja ne estis facila tasko vizitadi la pacientojn, kiuj rigardis al li kun senfina fido, kaj ne povi doni al ili la efikan medikamenton.

La poŝtejo estis ĉiutage sieĝata. La depeŝojn pri la proksimiĝanta savo jam atendis kun malpacienco ne nur doktoro Welch kaj la ĵurnalisto Hilton. La gepatroj de la malsanaj infanoj, ankaŭ tiuj, en kies domo la malsano ankoraŭ ne aperis, rapidis kelkfoje dum la tago al la poŝtejo por demandi, kio estas nova.

Ĉiu parto de la stafeto estis sekvata kun senspira streĉo. La nomojn de la veturantoj oni elparolis kun admiro kaj respekto. Kaj post ĉiu depeŝo sciiganta, ke ankoraŭ unu viro ekveturis, granda ŝtonego falis de sur la koro.

Tiun tagon, kiam el Ruby ekveturis Seppala, la vivo en Nome estis neordinare vigla. Neniel gravis la malpermeso pri amas-kunvenado. La homoj estis tiom impresitaj per tiu granda sciigo kaj ili devis komuniki al iu siajn sentojn.

“Ĉu vi jam aŭdis?” demandis unu la alian renkontiĝinte.

“Pri kio?”

“Nu, pri Seppala!”

“Ho, Seppala! Bonega homo . . . !”

“Kaj kion vi opinias—ĉu li sukcesos?”

“Li sukcesos. Seppala alvenos. Certe!”

“Sed la vojo estas tiom longa kaj—”

“—kaj danĝera, mi scias. Sed iu diris, ke li konas Seppala-n. Laŭdire li estas viro kvazaŭ el ŝtalo. Kaj mi—mi mem ne scias, kial mi tiom fidas lin. Sed io senĉese diras al mi, ke Seppala alvenos.”

“Nur ke . . . !”

Ju pli longe la telegraf-oficejo en Unalaklik silentis, des pli multe kreskis la fido al Seppala. Neniu volis malesperi. Neniu havis sufiĉe da forto por allasi la penson, ke Seppala povus pereii en la dezerto. Ili vidis la teruran polusan ventegon, kiu eĉ en ilia lando estis supernormale akra. Ili sciis, ke la regiono, kiun traveturas Seppala, estas plena de danĝeroj. Ke tie troviĝas perfidaj marĉaĵoj kaj montoj kun abismoj. Ke tie vivas malsata kaj danĝera bestaro.

Kaj tamen ili kredis. Ili kredis kun tiu stranga kredo, kiun la homo kapablas havi nur tiam, kiam al li jam nenio alia restas. Ili krome ja bezonis ĝin, ĉar nur tiamaniere ili povis forpeli la ombrojn de la malespero kaj dubo, kiuj en iu kaŝita anguleto de iliaj animoj neforpeblele nigris.

Sed kiam venis la depeŝo pri la alveno de Seppala en Unalaklik, kiam la tutan vesperon kaj longe tra la nokto estis aŭdebla neniu alia frazo ol “Seppala alvenis !”, kiun ili elparolis kun malsekiĝintaj okuloj kaj tremantaj lipoj—nur tiam ili senvorte konfesis, kiom bazita sur espero estis ilia kredo . . .

La ekscito kulminis, kiam Unalaklik komunikis, ke Gunnard Kasson estas survoje.

Gunnard Kasson !

Pri li pensis doktoro Welch tage kaj nokte. Kaj ne nur doktoro Welch. Ankaŭ aliaj viroj en Nome kaj, sekve de la komunikoj de Hilton, en la tuta mondo. Kaj kompreneble precipe la patrinojn, kiuj kun rideto sur la vizaĝo, sed kun la koro sanganta kliniĝis super malsanaj infanoj kaj ilin konsolis, ĝojigis kaj kuraĝigis la nuraj du vortoj : Gunnard Kasson . . .

Jam la sono de la fera nomo povis plifortigi. Ne estis necese koni Gunnard Kasson. Sufiĉis elparoli lian nomon, malmolan kaj koncizan, kaj jam oni vidis antaŭ si la viron, kiu povis kuraĝe vizaĝ-al-vizaĝe starigi sin kontraŭ eĉ la plej granda danĝero.

Gunnard Kasson estas survoje.

Ĉu li venkos ?

VIII. Gunnard Kasson

GUNNARD KASSON povis elekti : li povis veturi aŭ sur la firma tero, aŭ sur la maro. La vojo sur la bordo estis ja pli sekura, sed tre longa. La rekta vojo tra la frostita golfo Norton estis tre malcerta, sed multe malpli longa.

Ĉiu horo havis grandan valoron. En Unalaklik venis telegramo el Nome pri la unuaj viktimoj de la diferio. Pro tio Kasson decidis, ke li veturos sur la maro.

Li sciis, ke la plej malfacila tasko sur la maro estos orientado. Se lumus steloj, li facile povus trovi la direkton de la veturo. Sed la ventego daŭris per neniel malpligrandigita forto. Ĝi malebligis antaŭenrigardon kaj blindigis. Nenie estis videblaj firmaj punktoj, kiuj plifaciligus la orientadon. Tial li kunprenis perfektan fosforeskan kompason, laŭ kiu li povis tre precize konstati la direkton de la veturo. Nokte li estis devigata rigardi ĝin preskaŭ seninterrompe.

Kiam ekkrepuskis la norda tago, la veturo estis jam pli bona. Sed ju pli li malproksimiĝis de la firma tero, des pli multaj danĝeroj atendis lin survoje. Ne temis nur pri oftaj fendoj en la glacio, kiuj faris la veturon tiom danĝera. Tre ofte malhelpis la veturon glaciblokoj, kiuj tre alte elstaris. Iuj estis tiom altaj, ke li devis ĉirkaŭveturi ilin. Sed se la glaci-monto estis tre alta kaj krom tio etendiĝis tre malproksimen, tiel ke la ĉirkaŭveturo daŭrus tro longe, tiam Kasson pli volonte transveturis ĝin.

Tio estis tre malfacila, ĉar la antaŭaj hundoj devis grimpi al la pinto, surrampi ĝin, veturi sur la deklivo malsupren kaj tiri post si la restantajn hundojn kaj sledon.

Kaj malgraŭ tio Kasson pli volonte elektis ĉi tiun vojon, ĉar li ne volis senbezzone perdi eĉ unu minuton.

Kiam vesperiĝis, la ventego ĉesis.

Kasson nutris la hundojn kaj post mallonga ripozo li daŭrigis la veturon.

Pasis trankvila nokto, en kiu nur de tempo al tempo bruas la maro per la krakado de la glacio.

La sekvantan tagon hundoj metis la krurojn antaŭen nur kun la plej granda fortostreĉo. Kiel la jungaĵo de Seppala—ankaŭ ili sangis el multaj vundoj.

Kasson supozis, ke li atingos Nome matene la 2-an de februaro. Sed kiam jam proksimiĝis tagmezo kaj la firma tero ankoraŭ ne estis videbla, li maltrankviliĝis. Ĉu li eble tro deviis de la difinita direkto? Ĉu li ne erariris kaj nun veturas al la vasta Pacifika Oceano?

Je tiu ĉi penso li ektremis, ĉar tio signifus, ke liaj hundoj fariĝus sovaĝaj pro malsato kaj ke li mortus; sed tio signifus ankaŭ katastrofon por Nome—kaj kia ironio de la sorto kuŝus en tio, ke la stafeto trompis ĉiujn esperojn nur en la lasta stadio!

(daŭrigota)

A. D. Foote :

La Novulo

*Planedo verdkolora
Ja famas en renom' ;
Al sun' ĝi satelitas ;
Kaj eĉ se ĝin evitas,
Kaj pro la mens' ignora
Ne studas astronom',
Planedo verdkolora
Ja famas en renom'.*

*Ne al ĉiel' rigardu
Por trovi tiun ĉi !
Pivotas ĝi genie
Sur ajna loko, kie
Impulsas kora ardo
Al ĝia rotaci' ;
Ne al ĉiel' rigardu
Por trovi tiun ĉi !*

*Ol Marso pli fervora,
Pli rava ol Venus',
Pli verva, ol Merkuro,
Ĝi plenas de kulturo
De l'ardo ekvatora
Ĝis frosto de l'polus',
Ol Marso pli fervora,
Pli rava, ol Venus'.*

*Ĉar ĝiaj enloĝantoj
Adeptas al la Am',
Kaj kultas al ĉi dio
En frata harmonio
Per altpasiaj kantoj
Aŭ drasta vivodram',
Ĉar ĝiaj enloĝantoj
Adeptas al la Am'.*

*Kun memfiero ili
Ĝin nomas sia stel'.
Infano ĝi de l'astroj :
Sed flegis ĝin la mastroj,
Ke jam ĝi ŝajnas brili
Per nebrokanta hel' ;
Kun memfiero ili
Ĝin nomas sia stel'.*

*Sur tero jam okazos
Titana karambol'.
Planed' en sian rondon
Altiras jam la mondon !
Se pli kaj pli ĝi masos
Pro kresko de l'popol',
Sur tero jam okazos
Titana karambol' !*



ESPERANTO KAJ RADIO

Ĉiujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

En la tabelo la horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon.

Mallongigoj : I=Informoj, P=Parolado, K=Kurso

Dimanĉo	18.00–18.15	Sofia. 39.11m. I. Radio Sofia, Bulgarujo.
Lundo	07.15–07.30	Stockholm. 19.80m., 49.46m. P.
	07.45–08.00	Lille. 235m. K. I. Esperanto, 94 rue de la Rochelle, Tourcoing, (Nord), Francujo.
	14.30–15.00	Rio de Janeiro. 375m., 30.71m. K. I. Radio Ministério da Educação e Saude, Rio de Janeiro, (DF) Brazilo.
	15.15–15.30	Stockholm. 19.80m., 27.83m. P. Sveriges Radio, Stockholm 7, Svedlando.
	22.15–22.20	Hilversum, 402m. I. (ĉiun duan lundon) : V.A.R.A. Heuvellaan 33, Hilversum, Nederlando.
Mardo	00.45–01.00	Bauru. 91m., 240m. K. I. Radio Bauru, Brazilo.
	01.15–01.30	Stockholm. 19.80m., 27.83m. P.
	11.55–12.00	Bern. 48.66m., 31.04m., 16.87m. P. D-ro Baur. SRG, Kurzwelldienst, Neuengasse 23, Bern.
	17.35–17.40	Bern. Kiel je 11.55, sed anst. 16.87m., sur 19.60m.
	22.15–22.30	Gvatemalo. 49m. I. La Voz de Centro América, Guatemala Cd., C. Ameriko.
Merkredo	17.20–17.40	Roma. 25.40m., 31.35m. P. Radio Roma—Esperanto. Via Vitorio Veneto 56.
	21.35–21.40	Wien 513m., 25.46m., 48.74m. I. Radio Wien, Argentinierstr. 30a, Wien IV, Aŭstrujo.
Ĵaŭdo	08.30–08.45	Paris. 445m. K.
	11.55–12.00	Bern. Kiel marde. P. D-ro Privat.
	17.10–17.25	Wien. 203m., 25m., 30m., 41m., 48m. P. (ĉiun duan ĵaŭdon).
	17.35–17.40	Bern. Kiel marde. P. D-ro Privat.
Vendredo	17.20–17.40	Roma. Kiel merkrede.
Sabato	20.00–20.15	Sofia. 39.11m. I.
	22.15–22.20	Hilversum. 298m. P. K.R.O., Emmastraat 52, Hilversum, Nederlando.

La elsendoj de Lille estos interrompataj inter 15 julio kaj 15 oktobro. La stacio N.C.R.V. (Schuttersweg 8, Hilversum, Nederlando) elsendos prelegon en Esperanto sur ondolongo 298m. la 21an de septembro je 17.30.

Esperantista Vivo

Naskigoj

Bartholomeu. Al Ges. Bartholomeu (Caixa Postal 232, Bauru, Est. São Paulo, Brazilo) filo Gilberto Francisco, 5 junio 1951.

Clouser. Al Ges. Clouser (28B Court Drive, Lancaster Court, Wilmington 5, Del., Usono) filo David Earl, 18 julio 1951.

Denis. Al Ges. Denis (Saudrupt, Meuse, Francujo) filino Diana, 29 julio 1951.

Dupuis. Al Ges. Dupuis (Krukmakargatan 7 ö.g.III, Stockholm, Svedlando) filo Eric Folke, 7 junio 1951.

Holm. Al Ges. Holm (Tromsö, Norvegujo), ĝemeloj Arne kaj Ragnhild, 23 marto 1951.

Larglantier. Al Ges. Larglantier (29 Boulevard Murat, Paris 16, Francujo) filino Françoise, 25 julio 1951.

Naess. Al Ges. Naess (Stadsingeniør Dahls gate 58, Trondheim, Norvegujo) filo, 24 aprilo 1951.

Rossetti. Al Karola kaj Reto Rossetti (27 Harling Drive, Troon, Ayrshire, Skotlando) filino Anna Luiza Iva, 20 julio 1951.

Edziĝo

Hachin—Albault. F-ino H. Hachin al S-ro A. Albault, 31 julio 1951. Adreso: 6 rue de Douaumont, Toulouse, Francujo.

Niaj mortintoj

Ni eksciis pri la forpaso de la jenaj gesamideanoj, al kies parencoj ni volas esprimi nian profundan kondolencon.—RED.

Deane, F-ino L. M., en Broadstone, Anglujo. 14 junio 1951. Membro de UEA dum multaj jaroj.

Nowak, S-ino Sidonie, el Herford, Germanujo, rifuĝinto el Silezio, estis tragedie mortigita per aŭto apud la Kongresejo vendredon 10 aŭg. La entombigon ĉeestis kelkaj Munkenaj geesperantistoj jaŭdon 16 aŭg., kaj salutis ŝian memoron nome de UEA la kongresa sekretario, Mason Stuttard.

Pfister, S-ro H. en Männedorf, Svislando. 23 julio 1951.

van Zon, Frato Wigbertus, en Vught, Nederlando. 29 julio 1951, 82-jara. Fidela laboranto kaj del. de UEA.

“Antaŭ ol mi komencis legi, mi timis, ke mi ne havos sufiĉe da persisto por tralegi libron, kiu neniom interesas min. La supozo montriĝis erara. Mi ne sentis emon formeti la libron, nur emis daŭrigi ĝis la fino, kaj mi nenion transsaltis . . .”—*Stellan Engholm en Malgranda Revuo, Sept. 1948.*

“La intrigo de la verko koncernas spionojn dum la lasta mondmilito, kaj montras plian fojon la lertecon de la membroj de la Ĉefpolicejo londona, la fama “Scotland Yard,” kiun aliaj romanverkistoj jam brile laŭdis. La rakonto streĉas la menson, kaj tiel la rigardo flugas super la paĝoj, serĉante solvon de misteroj, neniel atentante la majstran laboron de la tradukinto.”—*I. G. Braga en O Brasil Esperantista, Junio 1948.*

“Speciala valoro de la libro estas, ke ĝi konigas la laboron, kutimojn kaj lingvon en la fervoja sfero, kaj per tio ĝi plenumas ankaŭ laŭdindan taskon klerigan. La traduko . . . estas tre bona. La eldonejo kaj la tradukinto meritas gratulon kaj grandan legantaron.”—*La Praktiko, Jan. 1949.*

vidu paĝon 225

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Centra Oficejo : Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

OFICIALA INFORMILO

N-ro 240

29-an de Julio 1951

STATISTIKO. Jen la stato de la membraro je la 28a de Julio, kaj ankaŭ, por komparo, je la sama dato en 1950 :

	1950	1951
Asociaj membroj	6811	6560
Individuaj membroj :		
MJ 800	826	
MA 4116	4410	
MS 286	274	
Patronoj .. 15	16	
DM 205	222	
HM 56	58	
	5478	5806
	12289	12366

DELEGITOJ

Aŭstralio

Perth. FD (Kuracado) : vakas.

Aŭstrujo

Döllach. FD (Karbminejaj aferoj) : Alois Postl, Döllach 11, Post Aŭ ĉe Aflenz (Steiermark).

Belgujo

Liège. FD (Fosfataj sterkoj) : J. Soyeur, rue du Chêne 91, Seraing. Tel : Liège 34.08.94.

Brazilo

João Pessoa. FD (Komerco) : R. Lemos Diniz, Caixa Postal 135. Tel : 1913.

Britujo

Amersham. D : vakas.

Bishop Auckland. FD (Instruado) : D. Kennedy, 21 Westfield Road.

Carlisle. D : vakas.

Glasgow. FD (Instruado) : vakas.

Jarrow. D : B. J. Edgecombe, 6 Elmfield Road, Monkton.

Newport (Isle of Wight). D : Pastro W. J. Carter, 109 Castle Road.

Ĉeĥoslovakujo

Brno. FD (Sociaj aferoj) : J. Ambroz, Brno-Zidenice, Špačková 3.

Danlando

Skern. D : vakas.

Francujo

L'Isle-Jourdain (Gers). D : H. Dalier, Pharmacie du Progrès. Tel : 95.

FD (Farmacio) : La D.

Germanujo

Bruchmachersen. D : vakas pro morto.

Kongo Belga

Peranto : kaj **Jadotville.** D : vakas.

Nederlando

Gorinchem. D : S-ino B. M. Slösser-Bresler, Plantsoen 8. Tel : K1830-2317.

Monnickendam. D : W. N. Kelder, de Zarken 4. Tel : 02995-575.

Veldhoven. D : H. M. Donkers, Kromstraat 25.

Norvegujo

Tromsö. FD (Komerco) : A. Högseth, Sjøgata 5. Tel : 538.

Portugalujo

Aveiro. D : D-ro P. Serra, Rua Marques Gomes 22.

Lisboa. D : J. Antunes, Rua dos Fanqueiros 106, 4, dto. Tel : 30434.

Svedlando

Valskog. D : F-ino Elin Zandrén. Tel : Köping 32100.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Ley, S-ino L. B., Andover, Anglujo

Harding, R., Umtali, Rodezio

Liebeck, D-ro S., Cape Town, Sud-Afriko

Ramos Filho, D-ro H., Rio de Janeiro, Brazilo

Ohana, B. S., Marrakech, Maroko

Schweizer-Bachmann, S-ino E., Zürich, Svislando

Gentle, L. I., London, Anglujo

MEMBRO-SUBTENANTOJ 1951

276. Blackstone, S-ino J. P., Orlovista, Fla.,

277. Blackstone, R., Orlovista, Fla., Usono

278. Fruba, E., Warszawa, Pollando

279. Gluckher, R., Konstanz, Germanujo

DONACOJ. H. Davies 20ŝ., Avoto 11ŝ. 6p., L. H. May 2ŝ. 6p., A. Lovati 18ŝ., A. Ploussu 12ŝ., A. R. Cohen 3ŝ. 6p.

Sinceran dankon al ĉiu helpanto

Jarlibro 1952. Se estas grupo en via urbo kiu regule kunvenas, bonvolu sendi al ni simplan sciigon pri tio sur poŝtkarto, tiel ke ni ricevu la informon antaŭ la fino de Oktobro. Ni intencas indiki ke oni petu ĝisdatan informon pri kunvenoj ĉe la delegito. Nur tion.

C. C. GOLDSMITH, *Ŝefretario.*

ANONCETOJ

Kosto : du pencoj por ĉiu vorto, aŭ internacia respondkupono por ĉiu duo da vortoj.

Ĉiu anoncanto morale devigas sin respondi minimume unu fojon al ĉiu kiu skribas.

Anonceto por iu numero devas atingi nin antaŭ la 6-a de la antaŭa monato.

Sendu Vian lumon kaj Vian veron, ke ili min gvidu, ke ili alvenigu min al Via sankta monto kaj al Via loĝejo. Ps. 43.3.

Antonio Pastor, Ercilla 49, 5, Bilbao, Hispanujo, deziras interŝanĝi il. pk. kun ĉiuj landoj. Ĉiam respondos.

Aaaaaaaaalt ! Legu Jarlibron pĝ. 55.

Nekatolikoj, kiuj deziras informojn pri la katolika religio povas ricevi ilin senpage de la Internacia Katolika Informejo, Sekretario, Fraterhuis, Loonopzand, Nederlando.

Ĉu vi deziras ricevi poŝtmarkojn de Izraelo, de la Proksima Oriento, ilustritajn poŝtkartojn kaj ilustritajn gazetojn de Izraelo ? Sendu al mi poŝtmarkojn de via lando, sed nur pm. kiuj aperis dum la jaroj 1950-51 (uzitaj kaj neuzitaj). Mi respondos nur per aerpoŝto. Mia adreso : Prof. Rosenfeld Arnold, Rchow Sireni 19, CHULON, Szykun Chadasz, Izraelo.

Vizitontoj al Festo de Britujo. Tiuj, kiuj deziras malkaran, neluksan loĝejon kun frumatenmanĝo ĉe samideanoj sin turnu al FD de UEA (Junulturismo) en Londono. Rabato por Esperantistoj.

Essen, la koro de la germana karbminea regiono, invitas la tutan mondon korespondi reciproke kaj viziti ĝin. Tranokteblecoj laŭplaĉe en malmultekostaj aŭ luksaj hoteloj aŭ ĉe samideanoj. Vizitservo konigos la mirindan ĉirkaŭaĵon. Skribu al D-ro Wegener, Hollestr. 1, Essen, Germanujo.

Esperanta Sanulejo estas fondota, kie oni povas vivi kaj lerni plejeble fariĝi centjara. Kiu sendos donacon por la sanulejo povos demandi laŭplaĉe. Volonte respondos D-ro Wegener, Hollestr. 1, Essen, Germanujo.

1000-gejapanoj deziras korespondi, interŝanĝi PM, PK aŭ gazetojn kun tuta mondo. Adresu al : ESP. Koresponda Grupo, 260, Oka-Shinmachi, Hirakata-city, Osaka, Japanujo.

Novaj esperantistoj, precipe gejunuloj, en la norvegaj urboj Stavanger kaj Sandnes okazigos letervesperon la 26-an de Novembro. Skribu al : Trygve Kvalvåg, Ole Bulls vei 10, Stavanger, Norvegujo.

La Verda Rondo en Habo aranĝos letervesperon la 25-an de Novembro ĉijare. Ni atendas il. poŝtkartojn kaj leterojn el la tuta mondo. Respondo garantiita ! Sendu al : La Verda Rondo, P.L. 625, Habo, Svedlando.

Kontistoj ! Mi serĉas aŭtoritatajn artikolojn el ĉiuj landoj pri la enlanda kontscienco. Alec Venture, 11 Colston Avenue, Carshalton, Anglujo.

Okcidentusonaj poŝtkartvesperoj okazos fine de Aŭgusto kaj ankaŭ en Novembro. Iver Svarstad, Box 181 Main Postoffice, Los Angeles, California, Usono.

Fraŭlo 19-jara deziras korespondi letere kaj per il.pk. tutmonde. Ĉiam respondos. Helmut Bocksch, (20b) Northeim, Germanujo.

Informojn pri reviziado (kontrolado) de ŝtataj elspezoj kaj enspezoj en diversaj landoj serĉas s-ro Svend Dragsted, Nybrovej 149, Lyngby, Danujo.

Deziras korespondi kaj interŝanĝi i.k. kun la tuta mondo, speciale afrikaj kaj orientaj landoj. Certe respondos : F-ino Maria Elisa Guimarães (instruistino), R. Mar. Deodoro, 221, Recife, Pernambuco, Brazilo kaj S-ro Laércio do Egito (studento), Av. Manuel Borba, 640, Recife, Pernambuco, Brazilo.

S-ro Humberto Guimarães (kalkulisto) deziras interŝanĝi sportajn gazetojn kun Francujo, Portugalujo, Hispanujo, Italujo kaj Sud-Amerikaj landoj. Nepre respondos. Adreso : R. Antonio Rangel, 107, Recife, Pernambuco, Brazilo.

J. G. Duyvetter, Dennenweg 25, Huis ter Heide, Nederlando, deziras interŝanĝi sian ekslibrison (lignogravuraĵo de la fama artisto Pam. C. Rueter, Amsterdam, 1947) por via samvalora ekslibriso. Respondo certa !

S-ro Horacio P. Santos, Rua Bororós 67-4-Ap. 42, São Paulo, Brazilo akceptas novajn gekorespondantojn, letere aŭ p. karte pri ĉiuj temoj.

F-ino Claudia Tecchio, Rua Augusta 2041, São Paulo, Brazilo, serĉas gekorespondantojn tutmonde poŝtkarte aŭ letere.

F-ino Adelina Dias, Rua Silva Teles 864, São Paulo, Brazilo, deziras korespondi pri ĉiuj aferoj kun tutmondaj gesamideanoj.

S-ro Virgilio Martins de Souza, Ginasio Estadual, Conchas, S. Paulo, Brazilo ŝatus korespondi kun tutmondaj gesamideanoj letere aŭ poŝtkarte.

S-ro Benedito Pacheco, Rua França Pinto 378, São Paulo, Brazilo, deziras korespondadi pri ĉiuj temoj kun gesamideanoj el la tuta mondo. Certe respondos.

S-ro Euclides Victor, Rua Cruzeiro 949 (barra Funda), São Paulo, Brazilo deziras korespondi letere aŭ poŝtkarte tutmonde.

S-ro Venissius Braga Salles, Rua Tapuios n-ro 112 (Penha), São Paulo, Brazilo, deziras korespondi kun gesamideanoj el tuta mondo.

S-ro Mario Egydio Ghirello, Rua Piratininga 522, São Paulo, Brazilo, pri ĉiuj temoj deziras korespondi letere aŭ poŝtkarte kun ĉiuj landoj.

S-ro Oscar Camanho, Rua Gaspar Fernandes 164 (vila Monumento), São Paulo, Brazilo, deziras korespondi poŝtkarte aŭ letere kun gesamideanoj el la tuta mondo. Garantias respondon.

Hispana samideano 20-jara deziras interŝanĝi bildpoŝtkartojn kun gesamideanoj el ĉiuj landoj. Nepre respondos Manuel Vives, San José 44, Moyá, Barna, Hispanujo.

Mi deziras propagandi nian lingvon. Mi ŝatus ricevi Esp. glumarkojn el ĉiuj landoj por ilin prezenti en fakaj ekspozicioj. R. Molera, Hospital 13, Moyá, Barna, Hispanujo.

Skoltfrato J. Juan Forné, Reloj Viejo 5, Valencia, Hispanujo, deziras korespondi kun ĉiulandaj skoltoj, hispane aŭ esperante.

36-jara fraŭlo deziras korespondi kun fraŭlinoj tutmonde. Skribu dum la nuna

monato al: "Tessera postale 326815 Fermoposta, Savona, Italujo."

La Tauranga Esp.-Klubo estis fondita la 12-an de Septembro 1950. Ni aranĝos festenon en Septembro 1951. Ni petas salutkartojn k.t.p. Nepre respondos. S-ro H. Stratford, 28 Morris Street, Tauranga, Nov-Zelando.

Farante paroladon kaj kurson en Pariza Medicina Fakultato dum Novembro 1951, mi deziras ricevi el ĉie, ĉiajn propagandajn dokumentojn, taŭgajn por Universitatoj, revuojn, k.t.p. Petas helpon de kuracistoj kaj studentoj, Pierre Berlot, 18 Rue de l'Annonciation, Paris 16—Francujo.

Kun Esperantistoj en malsanulejoj volonte korespondos s-ro S. G. Warley, 213, Embankment Road, Plymouth, Anglujo.

Du lektorinoj en hejmscienca kolegio deziras kompili internacian receptlibron. Bonvolu sendi tipajn receptojn de via lando; klaregigu kvantojn. Kontraŭ letero ni sendos belan bildkarton; diru ŝatkoncernojn. Skribu al: F-ino Boulton, College of Domestic Science, Hexham, Northumberland, Anglujo.

10 geoficistoj korespondos tutmonde. Esp. Rondo, Nippontuun-Kabusikigaisya, Umeda-tyo, Osaka, Japanujo.

Interstena Informilo fariĝis trimonata, malkara, beligita. Havebla ĉe naciaj perantoj aŭ ĉe la eldonanto en Tortona (Italujo).

Ferran Giménez Argente, Londres 94, 10, 3a, Barcelona, Hispanujo, deziras interŝanĝi p.m. tutmonde.

Lourival Cunha, Alagoinhas (Bahia), Brazilo, deziras interŝanĝi aerajn pm. el ĉiuj landoj laŭ Yvert katalogo.

Japanaj gestudentoj 15-18 jaraj deziras korespondi pri ĉiuj temoj. Adreso: Turumi-Kotogakko Esp.-Klubo, Yokohama, Turumi, Simosueyosi, 130, Japanujo.

MUNKENA KONGRESO

Belaj koloraj poŝtkartoj de Munkeno. Serio da 6 kontraŭ 2 int. respond-kuponoj.

**Esperanto-Centro,
Engelbertstr. 7, München-Pasing,
Germanujo**

OSLO

Kongresaj glumarkoj estas nun pretaj. Por ricevi 2 foliojn da 10 ekz. sendu

9p. aŭ 2 rpk. al

**Universala Esperanto-Asocio,
Heronsgate, Rickmansworth, Herts.,
Auglujo**

